Samuel von Pufendorf kiel ekonomikisto

Bo Sandelin*

Kiam la svedoj meze de la deksepa jarcento konkeris la provincon Skanio de la danoj, ili kulture kaj administre volis svedigi ĝin. Unu paŝo en tiu prceso estis fondado de sveda universitato en Lund en 1668. La jurfilozofo kaj historiisto Samuel von Pufendorf (1632-1694) estis unu el la erudiciaj germanoj kiuj estis vokataj kiel profesoroj, kaj nur li fariĝis fama en la tuta klera Eŭropo.

Lia signifo por la ekonomiko ĉefe venas pere de Adam Smith, kiu lernis la pensojn de Pufendorf jam kiel studento en la fino de la 1730-aj jaroj en Glasgow, kie Francis Hutcheson lekciis pri ili. Smith eksplicite apogas sin en *Lectures on Jurisprudenco* sur la aŭtoritato de Pufendorf pri natura juro. Poste, naturjuraj ideoj fariĝis fundamentaj en lia *Wealth of Nations* (1776).

Studoj kaj scienca kariero

Pufendorf komencis sian universitatan studadon en Leipzig kaj daŭrigis ĝin en Jena, kie precipe la

* D-ro ekon., docento, Ekonomika instituto, Universitato de Göteborg, Viktoriagatan 30, S-411 25 Göteborg, Svedio.

matematikisto Eberhard Weigel influis lin. Akirinte klerigadon pri kartezia filozofio kaj natursciencaj metodoj, Pufendorf provis doni al la jurscienco la saman ekzaktan karakteron, kiun li trovis ĉe la natursciencoj. Tiu klopodo karakterizas lian unuan gravan verkon *Elementorum jurisprudentiae universalis,* eldonita en 1660.

La unua, provizora varianto de tiu ĉi verko estis verkata en malfacilaj cirkonstancoj. En 1658 Pufendorf fariĝis guvernisto por la filoj de la sveda ambasadoro en la dana ĉefurbo Kopenhago. Sed baldaŭ komenciĝis milito inter Svedio kaj Danio. La danoj arestis la akompanantaron de la sveda ambasadoro, sed ne la ambasadoron mem, ĉar li jam forvojaĝis. Dum ok monatoj en malliberejo, Pufendorf ne povis legi sciencajn librojn. Sed li pensis pri tio, kion li antaŭe estis leginta en natura juro, kaj por pasigi la tedan tempon li konstruis juran sistemon sen intenco publikigi ĝin. Post sia liberiĝo, li vojaĝis kun siaj lernantoj al la universitato de Leyden en Holando. Tie oni konvinkis lin prespretigi sian manuskripton, kaj la libro estis eldonata en 1660.

La sekvontan jaron li fariĝis profesoro pri juro en Heidelberg, kie li en 1667 per provoka libro pri la german-romia imperio, *De statu imperii germanici,* kaŭzis amaran politikan kaj sciencan batalon. En tiu libro li provis pruvi ke la romia imperio estis anomalio, kiu ne plenumis la postulojn de monarkio aŭ respubliko.

La libro estis malpermesata en Germanio kaj kaŭzis problemojn por sia aŭtoro. Tial la invito fariĝi profesoro en Lund venis oportune. Li ja akceptis la postenon, kaj en Lund li eldonis sian jursciencan

ĉefverkon *De jure naturae et gentium* (Pri la juro de la naturo kaj la nacioj) en 1672. La universitato ĉesis funkcii en 1676 pro milito kontraŭ la danoj (oni restarigis ĝin en 1682), kaj en 1677 Pufendorf estis nomata regna historiografo. Tio estis posteno en la reĝa kancelario. Kiu okupis tiun ĉi postenon estis komisiita de la ŝtato al historia verkado. Kiel regna historiografo Pufendorf faris grandan verkon pri la tridekjara milito, kaj ĝin sekvis monografio pri reĝo Karl X Gustav. En 1688 li estis vokata al Berlin, kie li skribis la historion de la princo-elektisto Friedrich Wilhelm.

Universitata batalo

Ni reiru al la tempo en Lund. Kiam *De jure naturae et gentium* estis publikigita komenciĝis fama universitata batalo. Unu el la ĉefaj kontraŭuloj de Pufendorf estis la juristo Nicolaus Beckman, kiu ankaŭ estis germano. Li verŝajne batalis pro privataj kaŭzoj, li malvenkis kaj forlasis Svedion. Post tio li invitis Pufendorf al duelo en Hamburg.

Beckman donis al Pufendorf epitetojn, kiuj tiutempe estis tre insultaj: epikurano pelagiano, sociniano, hobbesano, karteziano, spinozano, kalvinano, poligamiulo, antinomiano kaj ateisto. Du aliaj antagonistoj estis la episkopo en Lund, Peder Winstrup, kaj la profesoro pri teologio Josua Schwartz.

Pufendorf estis esence karteziano, liaj kontraŭuloj antikartezianoj. La kartezia sinteno estis diversaspekte malkonforma al la eklezia. Tiel estis pri la kartezia opinio ke tiuj partoj el la Biblio, kiuj kontraŭas la natursciencajn eltrovaĵojn, ne povas esti akceptataj.

Tiel estis ankaŭ pri la meĥanika kaj determinisma mondkoncepto de la kartezianoj.

De jure naturae et gentium estis tro peza por ordinaraj studentoj. Tial Pufendorf resumis ĝiajn fundamentajn ideojn en lernolibro, *De officio hominis et civis juxta legem naturalem libri duo* (1673).

La naturaj leĝoj

La elirpunkto de Pufendorf - kaj poste de Smith en *Wealth of Nations* - estas ke la homo strebadas al sia propra prospero, "ke ĝi nenion amas pli multe ol sin mem, kaj ĉiel klopodas gardi sin; ke ĝi penas akiri tion, kio ŝajnas al ĝi bona, kaj forigi malbonon" (*De officio,* p. 19). La homo ankaŭ povas difekti aliajn homojn.

Por vivi, precipe kiel infano sed ankaŭ kiel plenkreskulo, la homo bezonas apogon de aliaj homoj. "Por esti sekura ĝi devas esti sociema, tio estas, ĝi devas unuiĝi kun similuloj kaj tiel kunduti al tiuj, ke ili ne havu kaŭzon malutili al ĝi, sed kontraŭe subteni kaj favori ĝiajn interesojn" (*De officio,* p. 21).

Ankaŭ Adam Smith akcentas ke homoj dependas unu de la aliaj. Interesa detalo estas, ke ambaŭ aŭtoroj atentigas, ke besto ĝenerale pli bone ol homo kapablas vivteni sin sola (*De officio,* p. 19, *Wealth of Nations,* p. 26).

La homo do estas socia estaĵo. Tiuj reguloj, kiuj instruas kiel la homo kondutu al aliaj homoj "por esti bona membro de la homa socio, nomiĝas naturaj leĝoj" (*De officio,* p. 21). Agoj kiuj favoras la homan kunvivadon estas, laŭ Pufendorf, konformaj al la naturlaj leĝoj, dum ĉio kio malhelpas aŭ ĉesigas la

kunvivadon estas malpermesata. En la posta paŝo Pufendorf montras ke la natura leĝaro estas kreita de Dio.

Kiel akiri sciojn pri la natura leĝaro? Ĝenerale oni diras ke ĝi estas "nature konata", sed tion oni ne komprenu kvazaŭ troviĝus "reguloj dirantaj kion fari aŭ ne fari en la animo de la homo ekde ties naskiĝo". Sed, "per la lumo de la racio, la natura leĝaro povas esti elserĉata". Krome, "almenaŭ la ĝeneralaj kaj ĉefaj reguloj de la natura leĝaro estas tiel simplaj kaj klaraj, ke ili tuj estas akceptataj kaj radikiĝas en nia animo, tiel ke ili neniam povos esti forigataj" (*De officio*, p. 23). Ekde nia infanaĝo ni per edukado akiras scion pri la natura leĝaro. Tial ni ne konscias kiam ĝi estis skribata en nia menso. Ni sentas kvazaŭ ĝi sekvus nin ekde nia naskiĝo, kiel la gepatra lingvo. Ĝi instruas kiel ni kondutu al aliuloj, sed ankaŭ al ni mem kaj al Dio.

Ŝtato kaj impostoj

Ĉar la homo bezonas apogon de aliaj homoj, oni starigis ŝtaton. Tiu ideo ne originas ĉe Pufendorf; ĝi aperas, i.a., en konata sekcio de Platono. (*Ŝtato*, p. 369. Tamen, Pufendorf polemikas kun Platono, ĉar tiu unue akcentas ke materiaj deziroj pri nutraĵoj, loĝejo kaj vestaĵoj pli bone povas esti kontentigataj en ŝtato, dum Pufendorf opinias ke la bezono de sekureco kaj protekto kontraŭ malbonfaroj de aliuloj estas pli grava faktoro. *De jure*, p. 653-654.)

Pufendorf imagas al si, ke la origina fondado okazis je du aŭ tri paŝoj (*De jure*, p. 665-666). Unue, oni interkonsentis unuiĝi en ŝtato. Poste, oni aprobis

dekreton pri kia reĝimo oni havu. Se tiu estu monakio aŭ reganta konsilio (kaj ne rekta demokratio), nova konsento estis necesa. Per tiu interkonsento la monarĥo aŭ konsilio promesis prizorgi la sekurecon de la popolo, dum la popolo promesis subiĝi al la volo de la reganto aŭ regantaro.

Por plenumi la kostajn ŝtatajn taskojn, impostoj estas bezonataj. La impostoj estu juste surmetataj. Tio implicas, ke ili estu iasence egalaj por ĉiuj (*De jure*, p. 874). La diskuto de Pufendorf parte similas al tiu de Knut Wicksell en ties *Finanztheoretische Untersuchungen* (1896), kaj al proponoj plurfoje ripetataj de la nobelpremiito 1986 James Buchanan. Ĉiuj tri evidente opinias ke justa imposto iel estas proporcia al la utilo, kiun la impostopaganto ricevas de tio, kio estas financata per la imposto; Wicksell akcentas, ke tolerebla origina distribuo de enspezoj kaj riĉeco estas premiso. Ne estas klare ĉu Wicksell kaj Buchanan legis kion Puendorf skribis, sed de Wicksell sur Buchanan estas rekta influo, kiel klarigas Buchanan (1987) mem.

Pufendorf traktas tri principojn por kalkuli justan imposton: Unue, reganto klopodu pri paco kaj sekureco. Paco estas pli-malpli avantaĝa por ĉiuj enloĝantoj. Se la rilato inter la avantaĝo de paco kaj la impostopago estas la sama por ĉiuj, la imposto estas iasence justa. Kelkaj homoj estas pli riĉaj ol aliaj kaj, sekve, posedas pli, kio estu defendata. Tial povus esti oportune kaj juste imposti proporcie al riĉeco aŭ eble al enspezo; ne estas tute klare kiun el tiuj du grandoj Pufendorf preferas.

Due, la ŝtato defendas ne nur materiajn posedaĵojn sed ankaŭ la vivon de la civitanoj, "kaj la vivo estas

same kara por riĉulo kiel por malriĉulo" (*De jure,* p.874). Tial oni povus postuli ankaŭ kapimposton, kiu estas same granda por ĉiuj.

La tria speco de imposto, pri kiu Pufendorf diskutas, estas imposto sur konsumo. Li diras, ke estas avantaĝo por la socio, se la riĉaĵo de la popolo kreskas. La demando estas, kiel tiu deziro pri kresko influu la impostadon. Ĉi tie li proksimiĝas al la demando de optimuma impostado, kiu estas sub diversaj premisoj analizata en modernaj fakrevuoj kaj libroj. Tamen, lia argumentado preskaŭ ekskluzive temas pri justeco, kiu estas nur unu konsiderinda faktoro.

La rezonado pri konsumimposto ne estas tre klara. Precipe la rilato inter stokaj kaj fluaj grandoj estas malklara. Tamen, la konkludo de Pufendorf estas, ke oni prefere impostu "konsumon, tiel ke konsumante sian propraĵon, homo nekonsciante pagas sian imposton al la ŝtato, proporcie ne al tio, kion li havas nun, sed al tio, kion li antaŭe posedis dank' al la protekto de la ŝtato" (p. 875).

Ŝajnas ke Pufendorf ĝenerale preferas konsumimposton al kapitalimposto aŭ enspezimposto. Sed li ne donas klaran respondon.

Prezoj

Kaj en *De officio* kaj en *De jure* Pufendorf en la komenco de la ĉapitro pri prezo parolas pri posedrajto. Kiam ĝi estis estigita, okazis ke iuj homoj ne havis tion, kion ili pleje deziris, sed havis abundon da aliaĵoj. Tial oni, unu kun la alia, bezonis interŝanĝi varojn kaj servojn. Por ke neniu suferu de la interŝanĝo, estis necese "asigni al ĉiuj objektoj

kvanton, laŭ kiu ili povus esti komparataj kaj akordigataj, unu kun la alia... Tiu kvanto ĝenerale estas nomata prezo" (*De officio,* p. 78).

Ne nur la fizika grandeco de objekto sed ankaŭ la "morala" kvalito influas la prezon. Do, granda hundo ne ĉiam havas pli altan prezon ol malgranda (*De jure,* p. 458).

Pufendorf distingas inter diversaj tipoj de prezoj (aŭ valoroj; uzante la latinan vorton *pretium,* kiu povas signifi kaj prezo kaj valoro, li ne distingas prezon de valoro). La plej grava distingo estas tiu inter la vulgara prezo (latine: *pretium vulgare*) kaj la eminenta prezo (latine: *pretium eminens*).

La vulgara prezo troviĝas en objektoj kaj agoj per kiuj oni komercas, kaj kiuj servas aŭ plezuras al homoj. Por kompreni la naturon de la vulgara prezo, oni devas, Pufendorf diras, distingi inter la fundamento de la prezo kaj tio, kio igas ĝin varii. La fundamento estas ĝuste la kapablo de la varo aŭ la servo kovri tion, kion oni bezonas por vivi aŭ por fari la vivon pli agrabla (*De jure,* p. 458). Do, Pufendorf prezentas tion, kion nuntempaj ekonomikistoj nomas utilo. En unu rilato li tial pli similas al la unuaj neoklasikuloj – Menger, Jevons k.a., kiuj vidis la prezon determinata precipe de la (marĝena) utilo – ol al la klasikuloj, kiuj pli akcentis la kostojn de produktado.

En la kunteksto Pufendorf komentas eldiron de Grotius, kiu diris ke la bezono estas la plej natura mezuro de la valoro de objekto. Ne sufiĉas, laŭ Pufendorf, konsideri la fizikan bezonon. Troviĝas objektoj, kiuj ne estas bezonataj sed nur pluzurigas, sed kiuj tamen havas prezon (*De jure,* p. 458). Aliflanke, troviĝas objektoj, kiuj estas utilaj, sed kiuj

ne havas prezon. La kaŭzo povas esti ke neniu posedas ilin, aŭ ke estas maloportune komerci per ili. Tiaj estas "la astroj kaj la vasta maro", ankaŭ "libera homo", "sunbrilo, klara kaj pura aero, la bela aspekto de la tero, se ĝi nur plezurigas la okulojn, kaj vento, kaj ombro, kaj similaĵoj" (*De officio,* p. 79). Sed por ĝui plurajn el tiuj aferoj, oni devas samtempe uzi la teron. Tial ili influas la prezon de bienoj kaj farmoj.

La utilo, aŭ alivorte "la kapablo de objekto aŭ ago kontribui, aŭ pere aŭ senpere, al la necesaĵoj de homa vivo aŭ al ties avantaĝo kaj plezuro", estas la fundamento de prezo, sed ne la sama kiel prezo (*De jure,* p. 676). Ĉu la prezo estas alta aŭ malalta ĉefe dependas de la kvanto de ofertado sur la merkato. Se la ofertado estas eksterordinare malgranda, la prezo estas eksterordinare alta. Dum Pufendorf malmulte diskutas la postuladon kaj evidente konsideras ĝin sufiĉe stabila, li dediĉas plurajn paĝojn en *De jure* al ekzemploj pri la influo de varia ofertado sur la prezon.

La egiptoj limigis la kulturadon de papiruso, kaj tiel tenis ĝian prezon alta. La holandanoj detruis samcele grandan parton de la kulturado de kariofilo kaj muskato en Hindio. Pufendorf atentigas, ke kiam Hanibalo sieĝis Kasilinon, muso estis vendata por ducent denaroj, "kaj tiu, kiu vendis ĝin, mortis pro malsato, dum la aĉetanto postvivis" (p.463).

Ofte tio, kio estas necesa, estas malmultekosta, ĉar la naturo abundas je ĝi. Inverse, nenecesaj sed malabundaj objektoj"kiel perloj kaj gemoj" povas esti maldece multekostaj.

Tiu tiel nomata prezoparadokso reaperas ĉe Adam Smith en lia klasika komparo de la prezo de akvo kaj la prezo de diamantoj (*Wealth of Nations,* p. 44-45).

Smith solvas la paradokson klarigante plurfoje la signifon de ofertado kaj postulado, t.e. esence en la sama maniero kiel Pufendorf.

Ni ne scias ĉu estis Pufendorf kiu inspiris Smith pri la prezoparadokso. Oni atentis ĝin multe pli frue. Sokrato diras en la dialogo *Eŭtidemo* de Platono: "Raraĵo, Eŭtidemo, estas multekosta, sed akvo, kiu tamen – laŭ Pindaro – estas la plej bona el ĉio, estas ankaŭ la plej malmultekosta el ĉio" (p. 304).

Pufendorf diras ke kelkfoje objekto estas valora nur por certa persono. La kaŭzo povas esti ke ĝi memorigas pri iu grava okazaĵo, ke oni estimas tiun, kiu donacis ĝin, ke oni per ĝi evitis akcidenton, aŭ ke oni mem faris ĝin. Tiam la objekto havas afekcian valoron (latine: *pretium affectionis*). Tiu tamen ne influu la vendoprezon. En kelkaj kazoj la aŭtoritatoj decidas pri prezo. Tiam oni nomas ĝin la legitiman prezon (latine: *pretium legitimum*).

La ordinara aŭ vulgara prezo, pri kiu ni ĉefe okupiĝis, esence estas determinata per la konduto de la agantoj sur la merkato. Kiel ni jam menciis, Pufendorf rimarkigas ke la vulgara prezo kutime variadas. Tio dependas ne nur de variado en la nombro de aĉetantoj kaj en la ofertado, sed ankaŭ, i.a., en variado en la kvanto da mono (*De jure,* p. 466, 473). Ni do trovas ĉe Pufendorf elementon de tio, kion ni hodiaŭ nomas la kvantoteorio, kiu ekhavis malbonan reputacion en la 1930-aj kaj 40-aj jaroj, sed kiu poste reviviĝis, precipe en la monetarisma skolo.

La ekesto de mona ekonomio estas priskribita kiel en modernaj lernolibroj: Kiam la homoj forlasis sian plej primitivan stadion kaj la komercado disvastiĝis, montriĝis maloportune ŝanĝi varon kontraŭ varo. Estus

pli oportune doni eminentan prezon al certa objekto, al kiu la vulgaraj prezoj de aliaj objektoj poste povus konformiĝi (p.263). Noblaj metaloj konvenas por esti atribuataj la eminentan prezon. Ili malfacile frotdifektiĝas, ili povas esti dividataj en pli malgrandaj pecoj, ili facile estas konservataj, kaj pro la rareco, malgranda metalkvanto havas grandan valoron.

Kiel ni jam menciis, la eminenta prezo estas unu el la du ĉefaj prezoj de Pufendorf. Ĝi troviĝas en moneroj kaj akompanas la metalvaloron, kiu estas influata de, i.a., importo de oro kaj arĝento. Ŝajnas, ke ĝi respondas al tio, kion ni nomas monvaloro. Tial, kiam la prezo de iu varo ŝanĝiĝas, ni devas diferencigi inter la kazo kiam la valoro de la varo mem ŝanĝiĝas kaj la kazo kiam la valoro de mono ŝanĝiĝas. La valoro de la varo ŝanĝiĝas, se la ofertado de la varo estas pli granda aŭ malgranda ol antaŭe, dum la kvanto da mono restas konstanta. La valoro de mono ŝanĝiĝas, se la kvanto da mono ŝanĝiĝas, dum la ofertado de la varo restas neŝanĝita (*De jure,* p. 698).

Joseph Schumpeter, en sia monumenta verko *History of Economic Analysis* (p. 122), opinias ke la vulgara kaj la eminenta prezoj de Pufendorf respondas al uzvaloro kaj interŝanĝvaloro de Smith kaj aliaj klasikuloj. Tio estas brava interpreto, kiu ŝajnas kontestebla, kvankam oni povas percepti ian parencecon inter la du konceptoparoj.

Finvortoj

Samuel von Pufendorf ne ĉefe estis ekonomikisto. Unue li estis historiisto kaj filozofo pri natura juro. Liaj naturjuraj ideoj estas interesaj por la evoluo de la

ekonomiko, ĉar ili influis la elirpunktojn de Adam Smith.

Kiel multaj erudiciuloj en tiu tempo, Pufendorf regis vastan kampon. Li analizis ankaŭ impostoprincipojn kaj tiel tipan ekonomikan problemon kiel determinadon de prezoj. Lia prezentado – kiu ĉi tie estas referita nur resume – eble ne ĉiam estas klara, sed ĝi ĉiam estas ĝuiga. Lia erudicio imponas kaj manifestiĝas per multegaj referencoj al okazaĵoj kaj verkistoj de la antikva kaj postaj epokoj.

Koncerne la determinadon de prezo, ni konstatis ke tio, kion nuntempaj ekonomikistoj nomas utilo, estis la baza elemento, sed ke precipe variado de la ofertado ankaŭ estis konsiderata grava. Estas interese ke Pufendorf, diference de la klasikuloj, apenaŭ havas ion, kio similas al kostobazita prezoteorio. Troviĝas iuj preterpasaj mencioj, ke kostoj influas la prezon, sed ili ne havas centran lokon. Tial Pufendorf iasence pli similas al la unuaj neoklasikuloj ol al la klasikuloj.

Referencoj

Almquist, J. E., (1941), "Samuel von Pufendorf och Nicolaus Beckman. En akademisk fejd på 1670-talet". *Lychnos.*

Buchanan, J., (1987), "The constitution of economic policy". *The American Economic Review,* n-ro 3, p. 243-250.

Lindroth, S., (1975), *Svensk lärdomshistoria. Stormaktstiden.* Norstedts, Stockholm.

Platon, (1984), *Skrifter i svensk tolkning.* Doxa, Lund.

Pufendorf, S. von, (1931), *Elementorum jurisprudentiae universalis libri duo*. Clarendon Press, Oxford, kaj Humphrey Milford, London. Vol. I estas faksimilo de eldono de 1672, vol. II estas angla traduko.

Pufendorf, S. von, (1934), *De jure naturae et gentium libri octo*. Clarendon Press, Oxford, Humphrey Milford, London, kaj Oxford University Press, New York. Vol. I estas faksimilo de eldono de 1688, vol. II estas angla traduko.

Pufendorf, S. von, (1927), *De officio hominis et civis juxta legem naturalem libri duo*. Oxford University Press, New York. Vol. I estas faksimilo de eldono de 1682, vol. II estas angla traduko.

Rosén, J., (1968), *Lunds universitets historia I, 1668-1709*. CWK Gleerup, Lund.

Sandelin, B., (1987), "Samuel von Pufendorf". *Ekonomisk Debatt,* n-ro 7, p. 573-578.

Sandelin, B., (red.), (1991), *The History of Swedish Economic Thought*. Routledge, London kaj New York.

Schumpeter, J., (1954), *History of Economic Analysis*. Oxford University Press, New York, kaj George Allen & Unwin, London.

Smith, A., (1978), *Lectures on Jurisprudence*. Clarendon Press, Oxford.

Smith, A., (1976), *An Inquiry into the Nature and Causes of the Wealth of Nations*. Redaktita de R. H.

Campbell, A. S. Skinner & W. B. Todd. Clarendon Press, Oxford. Unua eldono 1776.

Wicksell, K., (1896), *Finanztheoretische Untersuchungen nebst Darstellung und Kritik des Steuerwesens Schwedens*. Verlag von Gustav Fischer, Jena.